# Svisa Esperanto-Societo informas

## 2000 numero 3-a: majo / aŭgusto

Redakcio:
Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5
Retpoŝto:<gacond@bluewin.ch>
✆ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32
Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND

# Konatiĝo kun talentaj nuntempaj esperanto- verkistoj per rendevuo kun

# Ed BORSBOOM

## La Chaux-de-Fonds, sabaton 20-an de majo

Ni havos la unikan ŝancon ĝui la viziton de **Ed BORSBOOM** el De Bilt (Nederlando), **fakulo pri la esperanto-literaturo** kaj tre agrabla kaj humurplena preleganto. Li konigos al ni la valorajn nuntempajn verkistojn Jorge CAMACHO, John FRANCIS, Mauro NERVI, Trevor STEELE kaj Spomenka STIMEĈ. Ne maltrafu tiun ĉi unikan stud-rendevuon, kiu estas larĝe malfermita, ne nur al la kutimaj frekventantoj de la didaktikaj stud-sabatoj organizataj de Svisa ILEI-Sekcio, sed ankaŭ al ĉiuj interesatoj pri la evoluo de la originala literaturo en esperanto. SES aŭspicias tiun ĉi aranĝon, kiu okazos ĉe CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Por minimuma kovro de la elspezoj estos petita partoprenkotizo de po CHF 10.- por partoprenanto.

**Horaro de tiu ĉi rendevuo :**

9h00 : Malfermo de la CDELI-salono kaj de la prelega salono.
**10h00 : malfermo de la rendevuo**
**10h15-11h00 : 1-a prelego de Ed BORSBOOM**
11h00-11h15 : paŭzo. (Dum ĉiu paŭzo eblos aĉeti trinkaĵon)
**11h15-12h00 : 2-a prelego**

12h00-12h15 : paŭzo
**12h15-13h00 : 3-a prelego**
13h00-14h30 : tagmanĝa paŭzo en najbara itala restoracio.
**14h30-15h15 : 4- prelego**
15h15-15h30 : paŭzo
**15h30-16h00 : konkluda prelego kaj fermo de la aranĝo per kolektiva foto en la prelegejo mem.**
16-h00-17h00 : en la salono de CDELI eblos aĉeti brokantaĵojn kaj babili teumante kaj kafumante.
17h00 : Fermo de la CDELI-salono.

**Ĝeneralaj informoj**
La Biblioteko situas ĉe la strato « Progrès » Nro 33.
El la stacidomo la biblioteko atingeblas per la buslinio 4, direkto « Hôpital ». Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon « Bibliothèque ».
La enira pordo al la CDELI salono kaj al la prelegejo troviĝas norde de la biblioteka domo. Indikiloj gvidos vin.
Aŭtomobilantoj ne parku sian veturilon en la biblioteka korto, sed en la najbaraj stratoj. Ekde la urba enirejo videblas indikiloj kondukantaj al la biblioteko.

## Biografieto de Ed BORSBOOM

Ed Borsboom studis germanistikon kaj instruis ĝin en la lasta jardeko en la altlernejo de Utrecht. Ekde 1999 emerito. Lernis esperanton kiel junulo en 1951 kaj seninterrompe laboris por ĝi. Nuntempe li interalie estas prezidanto de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, kaj verkas biografion pri Andreo Cseh. Ĉiam diskonigis la esperantan kulturon inter samideanoj pere de kursoj kaj prelegoj.

# Ĉe niaj najbaroj

## Katalunujo

La **8-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo** okazos de la 30-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro en la urbo Blanes, provinco Girona (Katalunujo). Adreso por ricevi informojn: HFEA, Apartado 15027, ES-08080 Barcelona (Hispanujo). Retpoŝta adreso: luis_serrano@mixmail.com.

Kiel skribis al ni Carlo NICOLODI en Allschwil, tiuj nun tradiciaj katalunaj esperanto-semajnoj fariĝis ŝatataj kulturaj aranĝoj.

# Vivo de SES

# Protokolo

## Ĝenerala Kunveno de la 8a de aprilo en Luzern

La SES-prezidanto Bruno GRAF akurate malfermis la Ĝeneralan Kunvenon je la 14h00 per la bedaŭrinda anonco, ke Mireille GROSJEAN, kiu estis sin proponinta kiel protokolanto, ne povis veni pro kapdoloroj. Li dankas al Claude GACOND, kiu akceptis transpreni la koncernan taskon.

Senkulpiĝis la sekvaj SES-anoj : Nicole BEROUD, Lucien DAHAN, Arlette DI VETTA, Alain FAVRE, Renate FILALI, Margrit GULDIN, la kasistino Barbara POCHANKE devinta veturi Pollanden pro malsaniĝo de parenco, kaj Lilly SCHAERER.

La prezidanto dankas al la membroj de Lucerna Esperanto-Societo pro la bona aranĝo. Tuj poste, kiam li malfermis diskuton cele al la akcepto de la anoncita tagordo, Giorgio SILFER levis du procedurajn problemojn koncerne al la statuteco de la proponoj 7 kaj 8 kaj de persona propono, kiun li estis faronta koncerne al la sinteno de SES rilate al la salut-mesaĝo 2000 de la prezidanto de UEA. Li konstatas, ke nek lia propono, nek la 2 aliaj punktoj 7 kaj 8 de la tagordo obeas al la SES-statuto, kiu ordonas, ke la skribaj proponoj atingu la prezidanton kun tri subskriboj de SES-anoj. Neniu propono estis subskribita de 3 SES-membroj kaj sendita al la SES-prezidanto laŭ la statute fiksita limdato. Tial la koncernaj proponoj 7 kaj 8 kaj la 9-a, kiun li intencis fari, ne povas esti konsiderataj kiel validaj.

Dietrich WEIDMANN kontraŭstaras tiun proceduran formalaĵon, konsiderante, ke en Esperanto-Societo Zürich troviĝas pluraj SES-anoj.

La prezidanto opinias, ke ni ne devus esti tiel formalistaj kaj pli papaj ol la papo mem.

Sed Giorgio SILFER atentigas, ke SES estas submetita al 3 leĝaj bazoj : al la lingva respekto de la Fundamento de Esperanto, al la respekto de la propra statuto kaj al la respekto de la svisa civila kodo.

Bruno GRAF respondas, ke li ne sentas la neceson de tiu formaleco kaj ke en Esperanto-Societo Zürich troviĝas pluraj SES-membroj. Estas pro tio, ke li akceptis listigi la koncernan proponon kaj transprenis tiurilate la plenan respondecon.

Dietrich WEIDMANN bedaŭras la perdon de tempo pro statutaj problemoj.

Claude GACOND tamen atentigas la asembleon, ke ni certe havas la devon obei al la statuto de la societo.

Ĉesigante tiun diskuton, kiu jam daŭris pli ol duona horo, la prezid-anto elektigas Dieter ROOKE kaj Anĝelo MELLINI fare de la asembleo kiel voĉnombrantojn kaj voĉdonigas la tagordon, kiu estas akceptita per 21 jes kontraŭ 4 ne.

Giorgio SILFER anoncas, ke okaze de neobservo de la statuto, li ne hezitos plendi ĉe konflikto-komisiono.

Dietrich WEIDMANN konstatas, ke la plimulto de la ĉeestantoj akceptis la tagordon kaj ke tial la diskuto de la punktoj 7 kaj 8 povos disvolviĝi.

Dieter ROOKE rimarkas, ke okaze de kunvoko de venonta kunveno oni klare rememorigu la statutajn normojn koncerne al la proponoj.

**Punkto 3 : Protoko de la ĝenerala kunveno 1999 :**

La prezidanto transiras al la punkto 3 de la ĵus akceptita tag-ordo kaj la protokolo estas unu-anime akceptita kun la sindeteno de la protokolinto Sonja BRUN.

**Punkto 4 : Jarraporto 1999 :**

Bruno GRAF precizigas, ke la menciita gazet-artikolo en la revuo *« L'Educateur »* ne ankoraŭ aperis

Dietrich WEIDMANN bedaŭras, ke SES rezignis pri la servo de Argus, ĉar montriĝas ege mal-facile kontroli la gazet-artikolojn, kiuj raportas pri esperanto aŭ simple mencias esperanton pozitive aŭ negative.

Perla MARTINELLI opinias, ke rezigno je la servo de Argus estis falsa ŝparo.

Giorgio SILFER dankas pro la plenumita laboro, sed li atentigas pri unu danĝero en la nuna sinteno de SES, kiu ne devus agi kiel tegmenta organizo. En federacia lando kiel Svislando la tasko de SES ne povas esti centralisma, sed ĉefe helpa al la aliaj esperanto-organizaĵoj lokaj kaj fakaj kun sinteno pli subtena ol kunordiga. Kaj li longe priskribas la nunan konsiston de la svisa esperanto-movado kun sendependaj lokaj kaj fakaj societoj kaj kun diversaj agad-centroj. Se inter ili en orienta Svislando Sunhejmo havas tre modestan influon, en la urbo La Chaux-de-Fonds troviĝas plur-eco da organizaĵoj tre signifaj, inter kiuj la eldonejo LF-koop, KCE ŝarĝita organizi la ekzamenojn kaj la arkivejo CDELI.

Sekve al lia sufiĉe longa parol-ado Nicole MARGOT petas, ke oni limigu la tempon de la intervenoj al po maksimume deko da minutoj. La prezidanto kaj la

asembleo esprimas sian konsenton.

Bruno GRAF anoncas, ke Lucerna Esperanto-Societo, kiu pendigis plej multe da afiŝoj okaze de la Ago-tagoj, ricevas la promesitajn CHF 100 kaj Paul SCHERRER, la prezidanto de la koncerna grupo mencias, ke la ĉefan laboron plenumis Sonja Brun.

Bruno GRAF, komplemente al la Jarraporto 1999 aperinta en *SES informas* 2000-2, memorigas, ke la Estraro fisksis al si celon kaj tiurilate li retroprojekcias kaj komentarias du afiŝojn, kiujn li titolis : **Ebloj / plusoj de SES 2000** kaj **Problemoj / minusoj de SES 2000**. Li atentigas, ke inter la jaroj 1997 kaj 1999 26 novaj membroj kaj 10 novaj abonantoj venis kompensi la perdojn, kiujn kaŭzas la maljuniĝo de la SES-anaro. Mankas laborfortoj kaj enketo pri la esperanto-kursoj montras, ke ili malmultas ĉefe en Alemanio. Montriĝas, ke eksteraj faktoj ofte pli efikas propagande, ol la propraj rimedoj imagataj de la lokaj societoj. Ekzemple kanzono en esperanto fare de la germanlingva kantgrupo « Freundeskreis » ŝatata de la junularo vekis scivolemon pri esperanto en Alemanio, sed koncerne al la esperanto-junularo en Svislando la stagno de JES estas reale malforta punkto. Pri la rezigno de la servoj de Argus la prezidanto asertas, ke agi estas pli necese ol reagi.

Dietrich WEIDMANN iom bedaŭras ke SES rezignis pri Argus. Li scias, ke sekve al la aktiveco de ESZ multaj mencioj de esperanto aperis en la gazetoj de la zurika regiono, sed ke apenaŭ kelkajn artikolojn ili kapablis mem kolekti.

Claude GACOND klarigas, kiel funkcias la reaga servo, kiun li gvidas en Romandio ekde la fondo de CDELI. Kiam aperas vere negativa artikolo, li ĝin fotokopie dissendas al pluraj personoj petante al ili reagon sen agresemo. Persone, pro sia statuso de CDELI-arkivisto, li ne reagas mem, sed gratulas la redakciojn, kiuj objektive raportas pri esperanto.

Propono de Giorgio SILFER, ke la Estraro de SES reekzamenu la situacion pri Argus estas unuanime akceptita.

La Jarraporto 1999-a estas unuanime aprobita kun 2 sindetenoj.

**Punkto 5 : Jarkalkulo kaj bilanco, Raporto de la kaskontrolantoj kaj Buĝeto 2000 :**

La prezidanto atentigas, ke la abono al LF ne estis listigita en la buĝeto 1999-a, ĉar jam pagita en la antaŭa jaro. Pago en 1999 estus kaŭzinta deficiton.

Giorgio SILFER respondas, ke la koncerna argumento estas erara, ĉar se SES estus devinta pagi la abonon en 1999, tiam la koncerna sumo estus listigita en la koncerna buĝeto 1999-a.

La prezidanto dankas al la kasistino Barbara POCHANKE pro la efektivigita laboro, kiun publikigis la nova kasistino. Sekve al ŝia demisio li havis la ŝancon trovi novan kompententan kasistinon en la persono de Elisabeth LAUPER loĝanta en la urbo La Chaux-de-Fonds. Librotenado apartenas al ŝia profesia fako. La asembleo esprimas sian ĝojon per aplaŭdo. Kun la nova kasistino estis decidite ne plu meti po CHF 1'000 jare al la kapitalo « Agado 2003 ».

Claude GACOND rememorigas, ke tiu agmaniero rezultis el siatempa decido de la asembleo, kiam ĝi konstatis, ke la donacoj por la « Agado 2003 » malaperis en la kapitalon mem de la societo. Li avertas, ke ni alproksimiĝas al la festado de la centjara jubileo de la naskiĝo de SES kaj de la esperantiĝo de la kulture signifaj pioniroj Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT. La antaŭviditaj agadoj nepre kaŭzos elspezojn, kies principo estis siatempe akceptita, kiam okaze de la centjariĝo de esperanto en 1987 SES troviĝis sen monrimedoj por digne marki tiun ĉi jubileon.

Dietrich WEIDMANN diras, ke la kapitalo de SES ne estas investita sufiĉe rentodone. Li pretas alporti ideojn al la Estraro por tiu ĉi investado.

Claude GACOND atentigas, ke kapitalo por la « Agado 2003 », proksimume CHF 20'000 devas resti disponebla. Li krome atentigas, ke nura unufoja informado de la redakcioj de la gazetoj, radioj kaj televidoj pri la centjara jubileo de esperanto kostis pli ol CHF 6'000, kiujn li akceptis grandparte mem pagi. Tial kiel tiama nova prezidanto de SES li lanĉis la menciitan « Agadon 2003 », por ke ekzistu monrimedoj por povi pli efike labori en la jaro 2003, ol en la senprograma jubilea jaro 1987.

Nicole MARGOT petas, ke la projekto « Agado 2003 » estu detale reekzamenita de la Estraro.

Sekve al tiuj diskutoj la jarraporto, jarkalkulo, bilanco kaj raporto de la kaskontrolantoj estas unuanime akceptitaj.

**Punkto 6 : reelekto de la Estraro :**

La prezidanto adiaŭas al la 2 membroj de la Estraro, kiuj esprimis la deziron eksiĝi : unue al Barbara POCHANKE, kiu ne povis plu ricevi la teknikan helpon de Ernst VON MAY, kiu estas grave malsana, due al Anĝelo MELLINI, la pioniro de la interreta hejmpaĝo de SES, kiu estis verk-

ita kun la teknika helpo de Rolf ERNST.

Tiun paĝaron troveblan sub www.esperanto.ch/ses projekcias kaj komentarias Anĝelo MELLINI.

Giorgio SILFER informiĝas pri la lu-kosto de tiu ĉi hejmpaĝo, kiu dependas de la servo de Dietrich WEIDMANN.

Dietrich WEIDMANN respondas, ke la koncerna helpo estas senpaga, kaj ke li alvokas la aliajn societojn ankaŭ profiti pri ĝi por publikigi propran hejmpaĝon kaj tiel konigi siajn ekziston kaj aktivecon.

Bruno GRAF sugestas la novan konsiston de la Estraro:

Bruno GRAF, prezidanto ; Perla MARTINELLI, vic-prezidanto ; Nicole MARGOT, franclingva sekretario, kiu sin deklaris preta ankaŭ ofici kiel ĝenerala sekretario ; Elisabeth LAUPER, kasisto. La germanlingva sekretariado bedaŭrinde vakas. Sonja BRUN plurfoje alportis sian helpon por precizaj agadoj, sed ŝi ne pretas transpreni la funkcion mem de germanlingva sekretario.

Bruno GRAF poste mencias, ke Giorgio SILFER anoncis sian kandidatiĝon, sed esprimas gravajn rezervojn kaj ne povas subteni ĝin.

Perla MARTINELLI klarigas, ke la kandidatiĝo de ŝia edzo rezultas el la alvoko de la Estraro trovi sekretarion kaj novajn estrarajn membrojn.

Nicole MARGOT kaj Claude GACOND ankaŭ opinias, ke por la bono mem de la nuna porcivita aktiveco de Giorgio SILFER, estas dezirinde, ke li ne troviĝu en la Estraro mem de SES.

Dietrich WEIDMANN anoncas, ke li pretas eniri la Estraron, sed ne kiel sekretario. Li ne havus la tempon redakti protokolojn, sed pretas vigle kunlabori kaj alporti la apogon de Esperanto-Societo Zürich.

Giorgio SILFER opinias, ke li havas la kapablon distingi inter la civitismo kaj SES.

Perla MARTINELLI atentigas, ke inter ŝi kaj ŝia edzo ne okazas miksiĝo de iliaj reciprokaj por-esperantantaj funkcioj kaj de la geedzaj aferoj.

Giorgio SILFER revenas al statuta proceduro. La asembleo elektas la Estraron, kiu konsistas el minimume 5 kaj maksimume 7 membroj. Poste tiuj ĉi elektitoj sin strukturas.

Dietrich WEIDMANN trovas kurioza la argumentadon de Giorgio SILFER, kaj postulas, ke kaze de elekto, ekzistu skribita dokumento, kiu klare indikos, ke ne povos okazi interferoj inter la aktivecoj de SES kaj la aktivecoj de LF-koop, de KCE kaj de la Civito. Se ne estos subskribita tia

dokumento, li ne akceptos eniri la Estraron.

Bruno GRAF bedaŭras la komplikecon de la situacio kaj proponas, ke okazu unuopa elekto.

Alvenas la vico de Claude GACOND doni proceduran klarigon. Ĉar la Estraro konsistas el minimume 5 kaj maksimume 7 membroj, kaj ĉar estas nur 6 kandidatoj, oni povas nur konsideri, ke aŭtomate ĉiuj estas tacite elektitaj. Por ke okazu elekto per baloto, devas esti pli da kandidatoj, ol da sidlokoj. Tial estis jam decidite siatempe, ke la Estraro konsistu el 5 elektitoj, por ke povu okazi baloto. La Estraro poste havas la rajton alelekti plusajn membrojn. Se oni volas, ke okazu baloto inter la 6 kandidatoj, oni unue decidu, ke nur 5 el ili povos eniri la elektitan Estraron.

Tiu propono pri 5-membra Estraro estas akceptita per 22 jes, 2 ne kaj 1 sindeteno. La Estraro konsistos do el 5 elektitoj.

Sekve al tiu ĉi decido la prezidanto okazigas sekretan voĉdonon.

**Punkto 7 : Duonigo de la kotizo :**

Kaj dum la voĉnombrantoj foriras por kalkuli la rezulton de la baloto, la prezidanto malfermas diskuton pri la punkto 7 : duonigo de la kotizo.

Dietrich WEIDMANN opinias, ke malaltigo de la kotizo kreskigos la nombron de la SES-anoj.

Bruno Graf apogas lin, ĉar la kolektiva abono al *« Literatura Foiro »* fariĝas finance tro peza.

Dietrich WEIDMANN proponas, ke la membroj, kiuj deziros ricevi la revuon LF povos eniri specialan membro-kategorion kun abono al LF.

Sonja BRUN sin demandas, ĉu se oni duonigas la enspezojn, la societo vere povos plifortiĝi membre kaj age.

Siaflanke Dieter ROOKE proponis kontraŭe, ke oni duobligu la kotizon. Oni duonigis siatempe la kotizon por la gejunuloj, sed tio ne instigis pli da junaj esperantistoj aliĝi al SES.

Nicole MARGOT atentigas, ke LF eldoniĝas sub la aŭspicio de SES. Ŝi bedaŭras kritikan sintenon de LF al UEA, kiu esprimiĝis en lasta numero kaj opinias, ke SES havas la rajton esprimi sian reagon al tiaj artikoloj.

Perla MARTINELLI opinias, ke duonigo de la kotizo povus esti katastrofa por SES.

Claude GACOND opinias, ke la koncerna diskuto montras la nematurecon de la propono. Kaj li atentigas, ke estas reala fakto, ke ĝi ne alvenis laŭ la statuta normo. Tajpante la numeron 2000-2 de *« SES informas »* li telefone informiĝis, por koni la tekston

mem de la publikigota propono, kaj montriĝis, ke la prezidanto ne estis ricevinta ĝin. Tial li devis mencii la paĝon 26-an de *« SES informas »*, kiu fakte rilatas al la raporto pri la koncerna decido en la protokolo mem de la Ĝenerala Kunveno de la 14-a de februaro de Esperanto-Societo Zürich. Voĉdoni la duonigon de la SES-kotizo 2001 sen koncerna raporto de la Estraro estus ja kontraŭstatuta ago. Tial Claude GACOND proponas, ke la asembleo ŝarĝu la Estraron studi la konsekvencojn de la koncerna propono de ESZ. Kaj se ĝi deziras, ke jam por la jaro 2001 la kotizo estu ŝanĝita, tiam ĝi organizu voĉdonon, ĉu skriban, ĉu per la kunvoko de eksterordinara asembleo. La Estraro dum sia studo pri la kotiza problemo havu kontakton kun la lokaj grupoj, por reale ekscii, ĉu malaltigo de la kotizo ebligos kreskigi la nombron de la SES-anoj.

Tiu ĉi propono estas akceptita per 22 jes kaj 1 ne. La Estraro estas do ŝarĝita ekzameni la kotizan problemon kaj tiel ne okazis kontraŭstatuta decido.

**Nova Estraro :**

La voĉkontrolantoj proklamas la rezulton de la baloto :

La nova Estraro konsistos el tiuj ĉi 5 membroj :

Elisabeth LAUPER : 23 voĉoj, Perla MARTINELLI : 23 voĉoj, Bruno GRAF : 22 voĉoj, Nicole MARGOT : 18 voĉoj, Dietrich WEIDMANN : 15 voĉoj.

Giorgio SILFER ricevis 3 voĉojn.

**Punkto 8 :**

La prezidanto mencias, ke Dieter ROOKE proponas servon kaj pretas mem plenumi ĝin. Tial li konsideras, ke li povos agi kiel komisiito de SES. Pro tio voĉdono ne estas necesa. Neniu petas malfermon de diskuto, same kiel koncerne al la propono, kiun Giorgio SILFER retiris.

La prezidanto fermas la kunvenon je la 17h00 kun konstato, ke la antaŭvidita vizito al la BOURBAKI-panoramo okazos alian fojon kaj antaŭdankante pro la adiaŭa manĝeto, kiu okazos en la sama salono.

Claude GACOND

## Kunsido de la Estraro

La unua kunsido de la nova Estraro de SES okazos la 17-an de junio en Bern.

# Ĉu okazis esperanto-kursoj en 1999 ?

Estas fakto, ke nuntempe la intereso pri esperanto estas minimuma. Kiu jam varbis por

kurso, tiu verŝajne perdis iluzion. Eĉ mi daŭre serĉas la misteron, kiel trovi interesatojn. Kadre de la Ĝenerala Kunveno 2000 en Luzern ni organizis informan eventon, sed ĉeestis nur esperantistoj ; gastoj forestis, kvankam aperis du gazetanoncoj kaj afiŝoj.

Apenaŭ la esperantistoj plimultiĝas per naskoj. Kursoj necesas, se ni volas pluekzisti. Mi enketis pri la kursoj okazintaj en 1999. Estis malfacile ricevi respondojn kaj necesis redemandi. Sed la respondoj, kiuj alvenis, estas menciindaj.

En **Genève** okazis mirige diversaj kursoj. En la mezlernejo Pierre-Marie CHARRIERE gvidis nedevigan kurson por gejunuloj per interreto, uzante *« Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons »*. Ĝis junio 8 lernantoj partoprenis ĝin kaj 3 ricevis ateston. Ekde septembro la menciita instruisto instruis al 6 lernantoj kaj 1 instruistino.

En la popola universitato de Genève Lucien DAHAN instruis esperanton al 8 komencantoj ĝis fine de junio kaj al 5 progresantoj ekde oktobro. Samloke Christiane SIXTUS donis enkondukan kurson al 2 personoj ekde oktobro. Ŝi ankaŭ enkondukis 3 interesatojn de januaro ĝis junio en « Point de rencontre » en Grand-Lancy.

En **La Chaux-de-Fonds** Claude GACOND estas rimarkinda kaj tre aktiva esperanto-pedagogo kaj informisto. Li raportis jene :

Mian studrondon por komencantoj de la merkreda vespero (dufoje monate) frekventis 10 komencantoj, kies granda plimulto estas instruistoj. La didaktikajn studsabatojn frekventis ankaŭ 10 esperantistoj.

La perkorespondan kurson mi nuntempe reverkas. Mi regule pertelefone konsilas esperanto-studantojn, kiuj alfrontas lingvan aŭ gramatikan problemojn, kaj mi korektas iliajn ekzercojn. Kelkaj telefonas el eksterlando.

Dum 1999 mi respondis al 61 informpetoj, prelegis 12 fojojn pri esperanto entute antaŭ pli ol 300 personoj kaj en CDELI mi ricevis 3-foje klasojn kun ties instruisto, kiuj venis informiĝi pri esperanto.

En **Le Locle** Mireille GROSJEAN gvidis fakultativan elementan kurson en la mezlernejo kun 7 lernantoj inter februaro kaj junio. Ŝi kelkfoje aludis pri esperanto en la instruado kaj lernantoj interesiĝis.

Ne okazis enkondukaj kursoj en Basel, Bern, Luzern, Wil, sed unu en Zürich. La germanlingvaj grupoj, kvankam aktivaj, espereble frontos la problemon kaj reekos la informan laboron. Sen varbado ne okazos kursoj.


La prezidanto Bruno GRAF

Esperanto-Societo Zuriko

ESZ

# Orientsvisa semajnfino

## Ostschweizer Wochenende



## 23/24 septembro 2000

Loko/Ort: Esperanto-Librejo Zuriko • Akazienstr. 6 • 8034 Zurik

**"Esperanto radiografisch - didaktische Hilfe für Lehrer"** (Kursleitung: Claude Gacond.) auch für Studieninteressierte

Provisorisches Programm:
Türöffnung Sa. 12.00 (Begrüssung, Kaffee und Snacks)
14.00 - 17.00 1. Kursblock mit Claude Gacond (Pause)
18.00 - 20.00 Fondueplausch
ab 20.00 Abendprogramm mit Salsa und Unterhaltung
So. 10.00 - 12.00 2. Kursblock mit Claude Gacond
12.30 Spagettiplausch
14.00 Treffen Deutschschweizer Esperanto-Aktivisten
Teilnahmegebühr Programm: Fr. 50.-
Mit Essen Fr. 70.-; Nur Essen Fr. 20.-

**"Esperanto radiografie - didaktika helpo al instruantoj"** (kursgvidanto: Claude Gacond.) ankaŭ por studemuloj

Provisora programo:
Pordmalfermo sa. 12.00 (salutado, kafo kaj manĝeto
14.00 - 17.00 1a kursbloko kun Claude Gacond (paŭ
18.00 - 20.00 fonduĝuado
ek de 20.00 vesperprogramo kun salso kaj distraĵoj
dim 10.00 - 12.00: 2a kursbloko kun Glaude Gacond
12.30 spagedoĝuado
14.00 renkontiĝo de la germansivsaj Esperanto-aktiv
Partopreno: Programo 50.-
Kun manĝoj Fr. 70.-; nur manĝoj Fr. 20.-

## Anmeldetalon / *Aliĝilo:*

**(kopiu kaj sendu al: Esperanto-Societo Zuriko, PF 858, CH-8034 Zuriko**
**fakso 01-2610479 • E-Mail/retpoŝto: info@esperanto.ch)**

Familienname/*Familia nomo:* ______________________
Vorname/*Individua nomo:* ______________________
Adresse/*Adreso* ______________________
PLZ-Ort/*PK-Loko* ______________________
Telefon/*telefono* ______________________
E-Mail/*Retadreso* ______________________

Mit meiner Unterschrift melde ich mich verbindlich an obiges Wochenende an. Per mia subskribo r aliĝas devige al la supremenciita semajnfino. Zahlungen bei Anmeldung auf/*pagoj ĉe aliĝo al:* Poŝtkonto **Amikaro Esperantisto 90-12622-6**

☐ Mi bezonas tranokteblecon (☐ ĉe gesamideanoj, ☐ junulargastejo; ☐ hotelo) kaj petas rezerva
Atentu, lokoj ĉe gesamideanoj kaj en junulargastejo estas limigitaj, do frue aliĝu!

Datum+Unterschrift/Dato+subskribo ______________________

# Movada vivo

## Ekskurso

### al la monto « Mont Racine » je dimanĉo 18-a de junio

Kunlabore kun Laŭzana Esperanto-Societo ni proponas la ĉi-sekvan migradan tagon, al kiu ĉiuj promenemuloj estas vigle invitataj. Familioj kun infanoj estas bonvenaj.

Por faciligi la organizon partoprenontoj bonvolu sin anonci al Claude GACOND ✆ 032 967 68 55 (CDELI matene) aŭ 032 926 52 32 (hejme vespere) indikante sian intencon ĉu pikniki, ĉu mendi tagmanĝon en la montara gastejo.

**Rendevuo je la 09h45 ĉe la bufedo de la stacidomo Les Hauts-Geneveys** ĉe la trajnlinio 223 Neuchâtel - La Chaux-de-Fonds.

Trajnuzantoj alvenu tra Neuchâtel por povi elveturi el Neuchâtel je la 09h08 por atingi Les Hauts-Geneveys je la 09h35. Tio respondas al forveturoj el Basel je la 07h22, Bern 08h22, Biel/Bienne 08h40, Genève 07h47, Lausanne 08h10, Zürich 07h06. El Le Locle forveturo okazu je la 09h06, La Chaux-de-Fonds 09h16 por atingi Les Hauts-Geneveys je la 09h23. Ĉiu nepre kontrolu la ekzaktecon de tiuj indikoj pro la junia fervoja horar-ŝanĝo.

La marŝado sur padoj paŝtejaj kaj arbaraj entutas proksimume 4 agrablajn horojn. Ĉiu kunhavu do marŝoŝuojn kaj kontraŭpluvilon, ĉar en tiu sezono fulmotondro ŝatas neatendite saluti nin !

**Migrado :**

**10h00 : Ekmarŝo el Les Hauts-Geneveys** (970 m) **al Mont-Racine** (1439 m) tra la paŝtejoj La Serment (1267 m) kaj la vidpunktejo Les Rochers Bruns (1415 m) por atingi la regionon de Mont-Racine **meztage**. Eblos pikniki tie admirante la vidaĵon aŭ mendi manĝaĵon en la montara restoracio La Grande Motte (1339 m). Post ripoza retroviĝo sur la supro ĉirkaŭ la **14h30** ni komencos trankvile alvali al La Sagne tra interesa statua pado, kie ĉiuj admiros la talenton de la skulptisto FAVRE. Sensoifiĝo kaj gustumo de « cornets à la crême » en la vilaĝo La Sagne (1022 m) ĉirkaŭ la **16h30** ĉe la hotelo Von Bergen konkludos tiun ekskurson.

El La Sagne forveturas trajnoj al La Chaux-de-Fonds je la 17h20, 18h22, 20h01 ktp. Ĉiu povos tiel elturniĝi por planadi sian trajnan rehejmiĝon aŭ retrovi sian

aŭtomobilon en Les Hauts-Geneveys, ĉu tuj post la teumo aŭ eĉ post agrabla vespermanĝo !

Ĉu tiu migrado en Ĵuraso plaĉas al vi ? Tiam tuj anoncu vian aliĝon kaj preĝadu al Zamenhof, por ke li intervenu ĉe la veterdio favore al sunakompano.

Okaze de pluvado ni restos en la regiono Val-de-Ruz, kie ekzistas kelkaj vidindaĵoj.

La organizantoj : Jaqueline VASSEROT kaj Claude GACOND

# CDELI

**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia**

**Biblioteko de la Urbo**

**Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds**

✆ 032 967 68 55.

**Retpoŝto:** <gacond@bluewin.ch>

Dum la venontaj monatoj CDELI estos alirebla la ĉisekvajn periodojn :

**Maje** ekde la 8-a ĝis la 31-a, krom la 22 kaj 23-aj.

**Junie** ekde la 13a ĝis la 30-a.

**Julie** ekde la 10-a ĝis la 31-a.

**Aŭguste** ekde la 7-a ĝis la 31-a.

Do principe la unuan semajnon de ĉiu monato ĝi estas fermita pro foresto de la arkivisto Claude GACOND.

La vizitemuloj bonvolu sin anonci telefone, por ke rendevuo povu esti antaŭfiksita. Principe CDELI estas vizitebla la matenon lunde, marde, merkrede kaj vendrede, sed la arkivisto pretas akcepti vizitantojn ankaŭ sabate kaj posttagmeze, sed nur kiam preciza rendevuo estas interkonsentita.

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

## Svisa ILEI Sekcio

François RANDIN: prezidanto
Vallombreuse 14, 1004 Lausanne
✆ kaj fakso 021 647 29 17
Retpoŝto:<ilei.ch@esperanto.nu>

## Pri la didaktikaj studsabatoj

Claude GACOND senpage helpadas al la studantoj kaj instruantoj de esperanto per la regula organizo de didaktikaj studsabatoj okazantaj principe ĉe CDELI la 3-an sabaton de la monato ekde la 10h00 ĝis la 12h45 kaj ekde la 14h15 ĝis la 16h00. Komuna tagmanĝo okazas en najbara itala restoracio.

Jen la datoj de la venontaj studsabatoj :

**Maje 20:** Ni havos la privilegion ricevi la viziton de nia nederlanda kolego Ed BORSBOOM. **Vidu la informojn sur la paĝoj 1 kaj 2.**

**Junie 17:**

1) Ĉiu partoprenanto estos invitata prezenti 5-minutan prelegeton pri temo memelektita;

2) sekvos diskutoj pri la koncernaj temoj kun la preleg-intoj;

3) Lingvaj ekzercoj celos lert-iĝon rilate al gramatikaj aŭ leksikaj mallertaĵoj rimarkitaj dum la koncernaj prelegoj kaj diskutoj. Aŭskulto de registraĵo objektivigos la situaciojn.

**Marŝemuloj atentu !** Je la sekva dimanĉo 18-a de junio okazos ekskurso al la monto « Mont Racine » organizita kun Laŭzana Esperanto-Societo. Vidu la informojn sur la paĝoj 12/13. Tio kuraĝigu studemulojn marŝemajn partopreni ambaŭ aranĝojn. Por tiuj, kiuj intencus tranokti en La Chaux-de-Fonds, Claude GACOND pretas rezervi tranoktejon.

**En julio kaj aŭgusto ni paŭzos.**

**Septembre 23/24** ni studos en Zürich kadre de **orientsvisa semajnfino** organizita de Esperanto-Societo Zürich. La studotemo estos **Esperanto radiografie**. Informoj troveblas sur la paĝo 11.

Jam rezervu la ĉisekvajn aŭtunajn datojn : **oktobre 21, novembre 18 kaj decembre 16.** Tiam ni intimiĝos kun la verkaro kaj penso de L. Zamenhof.

La preparlaboro de Claude GACOND estas faciligata, kiam la partoprenontoj sin anoncas per vivsigno telefona, interreta aŭ poŝtkarta.

# K.C.E.

**Kultura Centro Esperantista**
**Strato Postiers 27, Poŝtfako 311**
**2301 La Chaux-de-Fonds.**
✆ kaj fakso: (032) 926 74 07.
Retpoŝto:
<kce.esperanto@bluewin.ch>

## Venontaj aranĝoj

**Majo 27-28:** Ĉina semajnfino kun gastoj de Ĉina Akademio de Sciencoj.

**Junio 24-25:** Zofia BANET FORNALOWA: zamenhofologia semajnfino dediĉita al la familio Zamenhof + teatra vespero.

**Aŭgusto 08-20 :** Plurnivela inter-nacia kursaro. En ambaŭ semajnoj instruos Stano MARĈEK (elementa) kaj Ljubomir TRIFON-ĈOVSKI (meza), en la unua Stefan MACGILL (supera, pri didaktiko), en la dua Giorgio SILFER (supera, pri literaturo).

**Aŭgusto 20-21 :** Svisaj Esperanto-Ekzamenoj.

Ni memorigas, ke ekde la pasinta jaro la apogantoj de KCE ricev-adas detalajn sciigojn pri la aktiv-eco de KCE per rubriko publikig-ita en *Heroldo de Esperanto*.

# Universala Esperanto-Asocio

Sonja BRUN, ĉefdelegito kaj kongresperanto por Svislando.
Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz.
✆ 041 790 46 40.
Retpoŝto: <smbrun@freesurf.ch>

## Pri la 85-a UK

La 85-a Universala Kongreso en Tel-Aviv alproksimiĝas. Ŝajnas, ke multaj esperantistoj timas la varmegan veteron, ĉar ili ne ekzakte multnombre aliĝis, kiel en la pasintaj jaroj. Troviĝas avantaĝo en tio. La kongreso promesas iĝi supervidebla, pli persona, kvazaŭ intima. Estos pli facile havi kunecan senton kaj retrovi sin inter malpli ol mil samideanoj, ol inter du mil.

La kadra programo, la ekskursoj, la antaŭ- kaj post-kongresoj estas ekscitige allogaj.

Por tiuj, kiuj ĝis nun hezitis: aliĝo ankoraŭ eblas.

Ĝuu la someron, la feriojn, ĉu en Tel-Aviv, ĉu aliloke!

Ĉu mankas al vi la revuo *Esperanto*? Ĉu vi volas esti certa, ke la jarlibro alvenos? Kontrolu, ĉu vi rekotizis por la nuna jaro 2000.

Samideane Sonja BRUN.

# Grupa vivo

## Basel

**Esperanto-Societo Basel**
PF 103, 4005 Basel
✆ 0049 76 214 57 12
Kunvenoj: 20h00 en Restoracio Weiherhof, Neuweilerstr. 107

### Kunvenoj

**Majo** 20 : Konatiĝo kun Internet en la laborejo de Werner BREITUNG. Rendevuo je la 16h00 ĉe la malantaŭa enirejo de Barnoullianum, Klingelbergstr. 16, bushaltejo 33.

**Majo** 25 : Prelego de Hp. SENN.

**Junio** 22 : Kegloludo.

### Esperanto ĉe la movado
## Aufbau

Post apero de priesperanta artikolo en la komunista gazeto ***« Aufbau »***, estis anoncita esperanto-kurso komenconta en aprilo. Ni ĵus ricevis sciigon, ke alvenis sufiĉe da aliĝoj, por ke tiu ĉi kurso ekstartu. Plenan sukceson al ĝi deziras la redakcio de *« SES informas »*.

## Bern

**Esperanto-Societo Bern**

Prezidanto: Daniel RUCHTI

Kontaktadreso: Ueli HAENNI, Linckweg 2, Postfach, 3052 Zollikofen.

✆ 031 911 64 72

Kunvenoj: Ĉiumonate la unuan mardon je 19h30 en Restoracio «Al Forno», Spitalgasse 37, Bern.

**Datoj de la venontaj kunvenoj Junio** 06, **Julio** 04.

Bernanoj, bonvolu raporti pri viaj kunvenoj !

## La Chaux-de-Fonds

Studa rondo ĉe CDELI

Ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND aŭ alia instruanto

## Raporto

Legado de poemoj de Kálmán KALOCSAY el lia *Ezopa Saĝo* instigis komencantinon francigi la interesan enkondukon al tiu poemaro kaj pretigi esperantlingvan prelegeton, kiun ŝi prezentos la 10-an de majo. Alia kunveno estis dediĉita al la atenta legado de teksto de Spomenka STIMEĈ laŭtlegota dum la prelego de Ed BORSBOOM la 20-an de majo.

**Datoj de la venontaj kunvenoj: Majo** 10 kaj 24**, junio** 14 kaj 28, **aŭgusto** 23, **septembro** 13 kaj 27, **oktobro** 25, **novembro** 8 kaj 22 kaj **decembro** 13, kiu estos dediĉita al Zamenhofa Festeto.

## Genève

**Esperanto-Grupo "La Stelo"**

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

✆ 022 740 04 45

Monatkunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio *«Aux Cheminots»*, 7, rue des gares, Genève

### Ĝenerala asembleo

La ĝenerala asembleo de la 7-a de marto, kiun frekventis 13 personoj, elektis Gilda PACE kiel novan kasistinon sekve al la demisiemo de Christiane SIXTUS POT. Per adapto de la statuto estis decidite, ke kiam ne ekzistas komitato, tiam gvidas la societon la membroj partoprenantaj la monatajn kunvenojn.

### Lernantoj interesataj pri esperanto

En marto responde al informpeto de klaso de « Collège ROUSSEAU » kadre de kurso pri aplikata matematiko Yvonne COTTON iris prezenti esperanton al la koncernaj 17 lernantoj, kiujn vigle interesis la originaleco de la esperanta vortfarado.

### Historio de ĵurnalismo

Dum la aprila grup-kunveno Joĉjo TOMASZCZYK prelegis pri la

historio de ĵurnalismo en Svislando kaj en la mondo.

## Nova librokatalogo

Dankal la sindono de Eva VISCHER ekzistas nova katalogo de la Biblioteko de « La Stelo ». La koncerna listo de variaj libroj, diskoj, sonkasedoj kaj vidkasedoj, estas konsultebla dum la grupkunsidoj, kaj laŭ la ricevitaj pruntomendoj la bibliotekistino liveras la petitaĵojn okaze de la sekva kunveno.

# Lausanne

**Laŭzana Esperanto-Societo**
Case postale : 389, 1009 PULLY
✆: (021) 729 58 02
**E-mail**: <lausanne.ch @ esperanto.nu>
**Homepage**: <http://www.esperanto.ch>
**Kunvenoj**: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00
**Diskuta rondo**: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

## Kunvenoj

**Majo** 8 : monata kunveno
21 : geamikoj el Lion venos viziti Lausanne. Ili alvenos matene por admiri la katedralon kaj la malnovan urbon. Okazos poste komuna manĝo en la restoracio Manora je la 13h00. Posttagmeze, laŭ la vetero, okazos ĉu promenado lagborde ĉe Ouchy, ĉu vizito de la Olipia Muzeo.

**Junio** 18: **Ekskurso. Vidu la detalan programon sur la paĝoj 12/13.**
Aŭtune la renkontiĝoj okazos je la 4a de **septembro**, 2a de **oktobro**, 6a de **novembro** kaj 10a de **decembro kun Zamenhofa festo**.

# Luzern

**Lucerna Esperanto-Societo**
Adligenstr. 1/49, 6020 **Emmenbrücke**
✆ 041 280 46 12.
**Kunvenoj:** ĝenerale ĉiun trian jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

## Venontaj kunvenoj

**Majo 18 je la 20h00**: Kun Monika RUCKLI travivaĵoj kun ĉevaloj kaj azenoj.
**Junio 15 je la 20h00**: Kio kaj kiaj estas vespertoj kun Annelies DETTLING.
**Julio 8:** Ekskurso kun Louise BACHMANN.
**Aŭgusto 24:** Promenado kun Sonja BRUN.
**Septembro 21 je la 20h00**: Konsiloj de samaritanino kun Margrit SCHERER.
**Oktobro 19 je la 14h00**: Edukado de infanoj en esperanto kun Dieter ROOKE.

**Novembro 16 je la 14h00:** Kompilo de la programo 2001 kun Paul SCHERER.
Aldone je ĉiu unua merkredo de la monato okazas paroliga kunveno kun Franz BRÜGGER inter la 14h00 kaj 16h00 en la restoracio Big Ben, Winkelriedstrasse 39. Venontaj datoj: aprilo 5, majo 3, junio 6, julio 5, septembro 6, novembro 8, decembro 6.

La publikigo de tiu programo 2000 instigu kelkajn kontakt- kaj vojaĝemulojn al renkontiĝo kun LES-anoj.

# Neuchâtel

## Esperanto en lernejo

En la elementa lernejo de la kvartalo Les Parcs la klasoj kun siaj instruistoj pretigis vesperon por la publiko, kies temo estis **Interkultureco kaj internaciaj kontaktoj**. La instruisto Ernest GÄUMANN, kiu lernas esperanton, prezentis tiun ĉi lingvon al siaj gelernantoj kaj pretigis kun ili vicon da standoj, kie la vizitantoj povis akiri precizajn nociojn pri la gramatiko kaj vortfarada sistemo de esperanto. La gelernantoj entuziasme kaj nelacigeble plenumis sian instru-taskon kaj la publiko formata de gekamaradoj, geinstruistoj kaj ĉefe gepatroj montriĝis vigle interesata. Ankaŭ mi kaŝiĝis inter la vizitantoj kaj mi gratulis tiujn infanojn pro la ĝusteco de ilia elparolo de esperanto.

Claude Gacond

## Esperanto en video-filmo

Gilliane Sarah KERN sub la ret-adreso Gilliane.Kern@bluewin.ch sciigis al ni, ke por la video-filmo, kiun ŝi pretigis kun geamikoj kaj submetos al konkurso, estis elektita esperanto por la prezentaj frazoj. Siajn tekstojn ŝi kontroligis telefonante al CDELI. Jen kelkaj sciigoj pri tiu filmo, al kiu ni deziras sukceson. La anoncaj frazoj interalie listigas la aktoraron :

Gilliane KERN kaj Ibrahim CISS prezentas NATURE MORTE [le film passe] !HAPPY END !
Interpreto de : I. CISSE, G. KERN, G. PERRINJAQUET, N. PERRINJAQUET, J. BAILLOD, Fl. KERN, R. JACOTTET, F. JACOTTET, Fr. KERN, S. ROSSET, M. AUGIER, V. BREGUET, H. TRAORE.
Ilustrado de : 'ZA.
Muziko de: L'ORGUE DE BARBAFLUTE : Amour et printemps.
Sono de : I. CISSE.
Scenaro kaj realizo de : G. KERN.

Muntado de : G. KERN kaj I. CISSE.

Dankemo al : MAGASIN SWISSCOM (Neuchâtel), C. GACOND (La Chaux-de-Fonds)

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. ✆ 071 911 68 30

**Kunvenoj**: la unuan merkredon de la monato je la19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

## Pri la kluba vivo

**Majo 3:** Vojaĝ-impresoj tra la okcidenta Usono fare de B. S. POCHANKE, kun lumbildoj.

**Junio 7:** Prelego de T. WADOLOWSKA, el Pollando.

**Julio 5:** Ekskurso al Nieselberg (Neulanden) kun B. POCHANKE.

**Aŭgusto 6: Esperanto-Klubo Wil invitas la marŝemulojn al tuttaga ekskurso kun pikniko al Wissenbachschlucht (inter Flawil kaj Herisau). Ni renkontiĝos en la stacidomo de Flawil je la 10h20. Ne forgesu kunpreni piknikaĵon. Aliaj informoj riceveblas ĉe Verena Chaves-Walder: ✆ (071) 393 41 49.**

**Septembro 6:** Raporto pri la Universala Kongreso.

**Oktobro 4:** Temo elektota.

**Novembro 8 (dua merkredo):** Elektitaj lumbildoj pri svisaj regionoj kun Ernst GLÄTTLI.

**Decembro 6:** Nikolaa vespero kun B. POCHANKE, V. CHAVES-WALDER kaj L. SENNHAUSER.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH ✆ 01 251 50 25

retadreso: info@esperanto.ch

**Kunvenoj**: la 2-an lundon de la monato je la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich

## Nova kursprogramo

**Esperanto por komencantoj.**

**Kurso 2000-01:** Celo: bazaj konoj. Ĵaudvespere 19h00-20h45 de la 11-a de majo ĝis la 20-a de julio.

**Kurso 2000-02:** Celo: bazaj konoj. Ĵaŭdvespere de la 14-a de septembro ĝis la 23-a de novembro.

ESZ planas alilingvajn kursojn: Angla konversacio por komencantoj, hispana konversacio por komencantoj, germana por komencnantoj, kuba danco por komencantoj, kuba danco por progresintoj. Interesatoj petu la detalan programon.

**Orientvisa semajnfino**

23-24aj de septembro

Detalaj informoj sur la paĝo 11.

**Esperanto en Zurika radio!**

Esperantlingva programo en **Loka Radio Lora** ekde la somero aperos en propra vestaĵo kaj ankaŭ enestos la oficiala radioprogramo (interrete kaptebla sub http://www.lora.ch. La programo sub la nomo «Esperanto sonas poeme» per radio kapteblos ekde la 17-a de aŭgusto ĉiuĵaŭde je la 15h30 sur UKO je 97,5 MHz.

# Recenzo

## Ĉu ŝokterapio?

**Nomo**: Cxu esperanto postvivos la jaron 2045?
**Indikoj**: efikas kontraŭ endormiĝo kaj umbilikismo.
**Kontraŭindikoj**: povas provoki iujn alergiojn.
**Laboratorio**: Hans DUBOIS, Bellinzona, 2000 (2-a eldono).

Jen tiu brava d-ro CARLEVARO, kiu ne hezitis eniri la haŭton de eksteruloj, ĉu indiferentaj, ĉu kontraŭantaj esperanton, ĉu persvaditaj, ke ĝi fiaskis! Per originala esplorado li konceptis novan terapion - ne laŭ scienca metodo, sed per ĵurnalisme pamfleta intuicio. Li elprovis ĝin tuj, kaj kuraĝe, sur sia persono, kun la rezulto, ke li mem nun ankaŭ hurlas kun la lupoj!

La estimata doktoro kaj la legantoj bonvolu pardoni tiun iom leĝeran enkondukon, sed ĝi estas frukto de gripa stato kaj de karnavala etoso.

Oni ja devas koncedi, ke li traplukis konsiderinde multajn dokumentojn (lia bibliografio pruvas tion) por cementi sian tezon, kiu mallonge dirite estas: la angla fakte estas jam la internacia lingvo ĉie uzata kaj akceptita nuntempe. Do en la jaro 2045 niaj posteuloj havos nur kompatan rideton pri nia naiveco - kondiĉe ke CDELI daŭre ekzistos kaj ne brulis, ĉar nur historiistoj povos tiam ion scii pri la iama ekzisto de esperanto, en la ĝenerala publiko ĝia ekzisto ne estos plu konata. Ĉu la esperantistoj kulpas pri tio? Tute (aŭ preskaŭ) ne. Kulpas tiu fama «utilismo» hodiaŭ iĝanta ĉiopova, speco de natura leĝo en la senco de la darvina «batalo por la vivo»: la malpliforta aŭ neadaptita al la cirkonstancoj malaperos. En la evoluo de la vivestaĵoj tio efektive okazis, sed ĉu oni povas senpere apliki tion al evoluo de lingvo? Mi minimume dubas.

La elstara trajto de la carlevara studo estas, ke la aŭtoro komplete prisilentas la argumentojn favorajn al esperanto. Same li tre longe pritraktas la mitojn de

esperanto kaj de ties movado kaj per neniu vorto mencias la mitojn de la angla. Feliĉe ekzistas seriozaj kontribuoj pri tiu flanko de la medalo, ekzemple *«Le défi des langues»* de Claude PIRON (en la ĉapitro *«Mythes et réalités»*.

La homoj en la praktika vivo (sciencoj, ekonomio, informadiko, komuniko, turismo, ktp.) jam akceptis la anglan kiel internacian lingvon, taksas CARLEVARO, antaŭ ol interkonsento de la popoloj demokrate ĝin oficialigos, pri kio li ne dubas.

En tiu konekso mi memoras pri prelegserio esperantlingva en Radio Vieno (eble antaŭ dudek jaroj), en kiu la aŭtoro pruvis per ekzemploj el la monda historio, ke mondolingvon *«altrudas la respektivaj mondpotencoj»*, do ke fakte mondolingvo ĉiam altrudiĝis. Sed tio estas **nedemokrata** solvo de la lingvoproblemo. Tiu konstato ŝajnas al mi nuntempe ankaŭ valida por la angla lingvo.

Malgraŭ la tajdo favore al la angla sur nia vilaĝa globuso, mi tamen havas kelkan esperon por la zamenhofa solvo. En tiu senco estu permesate alia memorprunto nun rilate diskuton, kiun mi havis kiel 17-jara junulo kun mia avo. Li estis tiam prezidanto de la «Lia Rumantscha». Kiam mi diris al li, ke la latina lingvo pro sia nefacilo profunde enuas min kaj ke mi nun lernas esperanton, li estis skeptika: *«Vidu, ni ankaŭ klopodis krei inter-idioman romanĉan lingvon kaj ni malsukcesis, ĉar la reprezentantoj de la kvin idiomoj volis, ke la propra estu elektota kiel oficiala lingvo kaj ne povis toleri la influojn de la aliaj. Niaj nunaj klopodoj plu direktiĝas nur al subteno de la unuopaj idiomoj. Do, se kvin etaj homgrupoj jam ne povas konsenti pri komuna lingvo, kial la popoloj povus akcepti esperanton?»* - Li mortis antaŭ pli ol dudekkvin jaroj kaj ne povis ĝisvivi la oficialigon de Rumantsch Grischun, de la romanĉa interlingvo hodiaŭ utiligata interalie de la kantona administracio, kiam temas pri oficialaj publikaĵoj kaj leĝaj tekstoj pro **utilismaj** motivoj: ŝparo de traduk- kaj pres-kostoj! - Mia avo mirus, se li ankoraŭ vivus! - Li ankaŭ ne ĝisvivis nian epokon, en kiu la romanĉa radio elsendas preskaŭ dum la tuta tago, en kiu ĉe televido spekteblas kvarfoje semajne informaj kaj kulturaj programeroj kaj en kiu depost du jaroj ekzistas taga gazeto, kiu unuigis la antaŭe aperintajn periodaĵojn (ankaŭ pro **utilisma** motivo: koncentriĝo de la gazetaro). Ĉu ni rajtas konkludi el tio, ke esperanto povus altrudiĝi pro **utilismaj** motivoj (precipe se oni observas la ŝpareman politikon ĉe publikaj financoj je ĉiu nivelo) ? - Kompreneble, se esperanto havus

la saman oficialan agnoskon kaj same grandajn subvenciojn kiel nia kvara nacia lingvo, ĝia situacio estus malpli katastrofa, eĉ komforta.

Mi konkludas el tio, ke nenio daŭras eterne, ankaŭ ne la senfruktaj streĉoj por akceptigo de esperanto kiel internacia lingvo. Ni devas vidi ne nur ĝis la jaro 2045, sed havi pli vastan perspektivon. Cetere fari prognozon pri la okazontaĵoj de tiuj kvardekkvin proksimaj jaroj neniu vere serioze povas. La oficiala agnosko de esperanto ne venis en la unua jarcento de ĝia ekzisto, sed eble en la dua, malgraŭ la nunaj kontraŭaj ventoj. Certe la zamenhofaj *«senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras»* kaj *«Ni semas kaj semas konstante»* unuavide ŝajnas arkaikaj, sed se oni konsideras longan periodon, ili estas bonaj maksimoj por nia tempo inklina al tuja sed ofte efemera efikeco.

De tempo al tempo la aŭtoro gajigas la seriozan pritraktadon per humuraj parentezoj: ekzemple per la demando, kiam Svisio aliĝos al Usono? Aŭ ke la ĝenerala instruo de la angla ebligus interkompreniĝon de la germanoj kaj svisgermanoj! Evidente tio estas troigo! - Cetere Alemanio ne estas la sola regiono, kie oni ricevas dialektan respondon al demando en normlingvo. Similaj ekzemploj el aliaj landoj kaj lingvoj facile troveblus.

La konkludo de la studo estas malpli gaja kaj ne centprocente konsekvenca kun la tezo de la aŭtoro, ĉar li proponas al ni nuntempuloj tute **neutilisman** kaj neproduktivan taskon: konservi la memoron pri esperanto administrante ties kulturajn fosiliojn: ankoraŭ tro pozitiva konkludo! Estante logika kun si mem, li devus inciti nin komplete forlasi esperanton kaj samtempe propagandi, subteni, instrui kaj disvastigi la anglan (kontraŭbatali esperanton evidente ne necesas, ĉar ĝi formortos pro anemio)! Sed ne, li fakte estas indulga rilate esperanton kaj la esperantistojn. Ĉu koncedo de «pracelano» al «raŭmismo»?

Rapide ankoraŭ pri la supersignoj - aŭ pli bone pri ties anstataŭo per x-signo. Laŭ mi tio estas tutsimple manko de la interreta sistemo teknike plibonigebla (kaj plibonigenda) en estonto. Kiam informadiko estis aplikata en la presindustrio, oni diris al ni, ke tiu aŭ alia tipografia procedo aŭ litertipo «ne eblas», kaj hodiaŭ la programaroj estas tiel evoluintaj, ke oni kompreneble havas multe pli da ebloj ol en la tradicia tipografio.

Hans DUBOIS konfuzas du aferojn: librofaradon kaj interretan komunikadon. Ne estas la

samaj: serioza eldonisto disponas pri la supersignoj de la lingvo, en kiu li eldonas, kaj tio ne ŝanĝiĝis ankaŭ post apero de la tuttera reto! (DUBOIS eĉ diras, ke li havus la tiurilatajn signojn kaj povus ilin utiligi, sed ne uzas ilin, strange, ĉu?) Do, lia x-pravigo tute ne konvinkas min. Legante bele eldonitan libron mi ne volas deĉifri. En tipografio oni nomas tion **lego-komforto**. Se oni intencas disvastigi ian studon per interreto, oni facile povos per aŭtomata ordono en la eldonprogramaro anstataŭigi ekzemple **ĉ** per **cx**, ktp. Laŭ mi la xo (pravigebla uzo en fonetiko) en presita esperanta teksto aspektas ekzotike, kaj la leganto povus ricevi malfavoran impreson.

Kompreneble ni povus ankoraŭ longe diskuti pri la enhavo kaj formo de *«Cxu esperanto postvivos la jaron 2045?»*, sed mi konkludu dirante, ke tiu broŝuro havas nekontesteblan meriton: ĝi incitas al pripenso, provokas diversajn opiniojn kaj stimulas la neŭronojn (esperEble ne la neŭrozojn)!

Richard SCHNELLER

# Pri niaj supersignoj

## La Makrooj GROSSMANN tre utila transformilo

De André GROSSMANN, kies adresoj estas : 5, rue des Pyrénées, FR 68390 Baldersheim aŭ andreo.esperanto@mageos.com, mi ricevis tre utilan komputilan disketon, kiu ebligas aŭtomatigi la transformon de norma teksto kun esperantaj supersignoj al tekstversioj x-ortografia, h-ortografia, aŭ en kiuj la cirkumflekso troviĝas antaŭ aŭ post la literoj koncernataj. La inversaj transformoj el tiuj diversaj ortografioj al la norma esperanta skribo kun supersignoj ankaŭ eblas, same kiel la reĝustigo de la formoj « aw » aŭ « aux » aŭ « ax » al la norma « aŭ ». La koncernaj makrooj de André GROSSMANN konvenas al uzantoj de la sistemoj Windows 95 aŭ 98.

Post kontraŭvirusa kontrolo de tiu ĉi disketo mi instalis ĝian enhavon en la komputilon de CDELI kaj en mian hejman aparaton, kaj mi ĝue konstatis, kiel rapide tekstoj povas esti aliigitaj laŭ preciza bezono, ĉu revenigi tekstojn el diversaj ortografioj al la konvena skriba normo de esperanto, ĉu adaptigi norman tekston al ortografioj necesaj por

P.P.
CH-2305
La Chaux-de-Fonds 5

interretumi kun korespondantoj, kiuj ne posedas la sistemon « Unicode » aŭ la tiparojn de Evento kiel Boden Esperanto, Kuriero Esperanto, Orion Esperanto aŭ Tempo Esperanto. La disketo de GORSSMANN konvenas por ĉiuj tiuj tiparoj kaj eĉ ilin alportas al neposedantoj.

André GROSSMANN donis al sia makroaro la titolon « **cx=ĉ gx=ĝ jxĵ hxĥ sxŝ** », sed mi preferas nomi ĝin pli simple « Makrooj GROSSMANN ». Estas sub tiu titolo, ke mi dishavigos tiun ĉi makroaron en Svislando. Mi aĉetis ĝin kun la rajto povi ĝin senprofite disvendi en Svislando. Tiel sub la nomo "« **Makrooj GROSSMANN** » mi havigos kopion de tiu disketo al ĉiuj interesatoj kiuj ĝiros la monsumon de CHF 15.- al la poŝta ĉekokonto 23-4669-1 de Esperanto perkoresponde, 2300 La Chaux-de-Fonds, ne forgesante tre legeble skribi siajn nomon kaj adreson kaj aldoni la mencion : por ricevi la disketon « Makrooj GROSSMANN ». Tiu prezo enkludas la sendokostojn.

En la disketo troviĝas printeblaj klarigoj pri la instalado. Kiuj ilin atente tralegas, tiuj facile instalos kaj ekuzos la Makroojn GROSSMANN.

Tiuj uzontoj sciu, ke André GROSSMANN celas kompletigi siajn makroojn, tial estas grave, ke li ricevu kritikojn kaj konsilojn de uzantoj. Pro tio komence de la artikolo mi liveris liajn adresojn poŝtan kaj retan.

Claude GACOND


# KVINPETALO
## Esperanto-Centro
Rue du Lavoir, FR-86410 BOURESSE
✆ kaj faksilo: 0033 549 42 80 74

## Kurs-programo
**Septembro** 8-13 : **Pri literaturo : La recenza arto en esperanto** kun Ed BORSBOOM.


## Redakta limdato

Por ***SES informas*** **2000-4** (septembro-oktobro) la redakta limdato estas je la 20-a de aŭgusto 2000. Seeble ne sendu lasttage vian kontribuaĵon.